
# La Krokodil'

Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77; courriel : toulouse@esperanto.org



**n°11 decembro 2001**

Du gravaj eventoj okazis en novembro:

(1) Prelegdebato en Universitato, kun Brian MOON el Luksemburgo, kaj Christian HEN, prezidanto de Eŭropa Movado en Haute-Garonne.

(2) La jarkunveno de nia asocio.

## 1. Ĉu eŭropanoj bezonas komunan lingvon? Kiun?

Laŭ tiu temo prelegis Brian MOON, ĉeftrakukisto ĉe Eŭropa Komisiono en Luksemburgo kaj membro de Akademio de esperanto, ĉe la invito de Esperanto-Kultur-Centro kaj Eŭropa Movado/Haute-Garonne.

La prelegon aŭskultis kvindek personoj, ĉefe studentoj, en amfiteatro de la Universitato pri Sociaj Sciencoj. La publiko ricevis kiel dokumentojn, gazetar-revuon kaj libreton *Esperanto, mode d'emploi*.

Brian Moon tre dokumentite priskribis la lingvan situacion en la institucioj de la Eŭropa Unio kaj en la lernejaj sistemoj de la landoj. Li atentigis kiom diferencas la anoncitaj intencoj (egaleco de ĉiuj lingvoj) dis de la realo, helpe de multaj konkretaj ekzemploj kaj anekdotoj. Li montris kiom maljusta estas la nuna realo, kaj ke ĝi povas endanĝerigi la unuecon de la Unio.

Fine li malkovris ke pli justa solvo ekzistas, kaj priskribis la konturojn de la solvo pere de la internacia lingvo Esperanto.

La debato kiu sekvis levis malmultajn sed interesajn demandojn, kiel "Se esperanto fariĝos la lingvo de Eŭropo, kiel ĝi povos esti lingvo de la homaro?"

Christian HEN nur tre mallonge prezentis la temon, kaj la aliaj membroj de Eŭropa Movado fakte ne intervenis en la debato. Ni ne scias ĉu ilin vere interesas la temo.

Multan dankon al Brian Moon, kiu ne nuligis sian partoprenon, malgrau sia ĵusa funebro.

## 2 - Decidoj de la jar-kunveno

- Oni aprobis unuanime la tre riĉan agadraporton kaj la financan raporton.
- Reelektiĝis tri komitatanoj kies mandato finiĝis (V. Fourcassié, D. Maynau kaj C. Vidotto).
- La nova komitato konsistas do el:
- **Daniel Maynau** (prezidanto), **Vincent Fourcassié** (kasisto), **Jeanne-Marie Cash** (sekretario), **Caroline Haïoun**, kaj **Christine Vidotto**.
- Oni aprobis la kunlaborajn eventojn, kiel la Zamenhof-feston kaj prelegdebaton kun Eŭropa Movado, kaj volas pluiri en tiun direkton.
- La nova kotizo estos 15 eŭroj.
- Caroline Haïoun kaj Flavie Audibert prizorgos la plibeligon de la klubejo.
  *(Kompletan protokolon vi povas ricevi laŭpete)*

## Sommaire :

**Prelegdebato "ĉu Europanoj bezonas komunan lingvon ? Kiun ? " p.1**

**Decidoj de la jarkunveno p.1**

**Zamenhof-festo p.2**

**Stud-semajnfino en Arrout (09) p.3**

**Vespero kun Adurahman JUNUSOV kaj Reĝkuko p.3**

**12 élèves au club d'espéranto du Collège de Castanet p.4**

**Nia kalendaro p.4**

**Rapport d'activité 2000/2001 p.5**

**En decembro okazos**

# Zamenhof-festo

## dimanĉon la 6an de decembro

**Maison de Quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 Toulouse**

## Programo

**12.00 Akcepto.**

**12.30 Aperitivo-koncerto kun Arieĝa Esperanto-Koruso.**

**13.00 Tagmanĝo kun varmaj kaj malvarmaj pladoj (menuo disponigota laŭpete).**

**14.00 Paroladoj (eventuale?), babilado, vizito de la libroservo, kaj ekspozicio.**

**15.00 Prezento de teatraĵo *Rekta Metodo* de Tristan Bernard, adaptita de Gaston Moch kaj Georges Lagrange, reĝisoro: Arno Lagrange.**

**16.00 Publika koncerto**

**Ali ATEIA ludos iranan sitaron.**

**JoMo sola, kantos akustike varistile, popajn, rokajn, folkajn kantojn, kaj kantojn de la hispana milito , en esperanto sed ankaŭ en okcitana lingvo. Li Prezentos sian novan diskon.**

**18.00 Fino, aŭ diskoteko por tiuj kiuj deziros plufesti.**

**Libro-servo kaj trinkejo malfermaj dum la tuta posttagmezo.**

**Prezo por la tagmanĝo kaj la spektaklo: 100 FrF.**

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

**Aliĝilo resendota al TEF, 6 rue G. Voisin, 31130 Balma. Info: 05.61.24.14.45 aŭ 61.25.55.77**

**<u>antaŭ la 3a de decembro</u>**

**Nomo**

**Adreso**

**Tel. / courriel:**

**Partoprenos la Zamenhof-feston, dim. 16an de dec. 2001**

**Pagas al Esperanto-Kultur-Centro : . . . . .x 100 F = , per <u>bank-ĉeko</u> – <u>poŝtĉeko</u> – <u>alie</u>**

**Dato Subskribo**

## Comment venir à la Maison de Quartier Rangueil ?

**La rue Claude Forbin se termine en impasse. Au fond il y a un petit rond-point sur lequel donne un parking. Il faut se garer là. La Maison de Quartier est ce bâtiment de plain-pied, moderne et métallique, attenant au parking, et fait face à une école. Suivez les flèches pour trouver l'entrée.**

**En bus : 24 (arrêt Virgile).**

**92 (arrêt Duguay-Trouin) (s'il est remis en service).**

**Depuis la gare Matabiau : prendre le métro jusqu'à Capitole, puis le bus 24 (avec le même ticket).**

**En cas de difficulté pour vous y rendre, l'équipe de la fête de Zamenhof se fera un plaisir d'aller vous chercher à la gare. Téléphonez quelques jours avant.**

## Por praktiki la lingvon

**En januaro kaj februaro**

### Studsemajnfino en Arrout (09): 26-27 januaro

**Semajnfino por ekzerci traduk-arton_okazos en Arrout, ĉe la Sunkompanio, kiu ĉiam afable akceptos nin.**

**La prezo, 30,50 € (200 FrF), aŭ 21,50 € (140 FrF) por studentoj kaj senlaboruloj, entenas tranokton en plurlitaj ĉambroj, matenmanĝon, kaj du manĝojn.**

**Partoprenantoj havu minimume nivelon de la unuagrada ekzameno.**

**Interesitoj kontaktu nin frue, por pli bone organizi, elekti taŭgajn tekstojn, ktp.**

**Tel : 05 61 25 55 77, courriel : toulouse@esperanto.org.**

### Vespero kun Abdurahman JUNUSOV kaj regalado per Reĝkuko

**Vendredon 1-an de februaro, je la 20h30, 9 rue Marengo (ĉe la fervojistoj)**

**La fervojista grupo kaj EKC invitas vin al festa kaj kultura vespero kun ĵurnalisto el Dagestano (kaŭkaza lando, apud Ĉeĉenio). Okaze de sia prelegturneo en Francio, A. JUNUSOV prezentos al ni sian landon, kaj respondos niajn demandojn.**

**La dua parto de la vespero, dum kiu ni povos daŭrigi la diskuton, estos la tradicia Reĝkuko, preparita de la fervojistoj.**

**Financa partopreno por la kostoj: 3 €.**

**Enskribiĝu telefone ĉe Josée Lafosse: 05.61.24.14.45.**

## Intervjuo kun Abdurahman. Junusov

***- Abdurahman, kiu vi estas?***

**Mi naskiĝis en la montara vilaĝo Kumuh (la centro de la laka regiono), sed de frua infaneco loĝis ĉiam en Mahaĉkala (krom du jaroj en Hungario kaj Belgio). Laŭ la nacieco mi estas lako. Mi finis filologian fakultaton de Dagestana Ŝtata Universitato, kaj ricevis diplomon pri la rusa lingvo kaj literaturo. Cetere, la temoj de miaj kursa kaj diploma verkoj estis *Esperanto, problemoj de la arta traduko*. Nun mi estas ĵurnalisto.**

***- Fakoj en ĵurnalismo?***

**Dum pli ol 20 jaroj mi laboris en Dagestana Respublika Televido kiel redaktoro, ĉefredaktoro pri muziko kaj ĉefredaktoro pri arto kaj kulturo. Dum tiuj jaroj mi partoprenis (kaj gajnis premiojn) en diversaj konkursoj kaj festivaloj. En 1994 oni proponis al mi iĝi redaktoro de E-gazeto *Eventoj* (Budapeŝto), kaj mi laboris tie dum du jaroj (krome, dum 3 monatoj en la redakcio de *Monato* en Antverpeno). Nun mi laboras kiel ĉefredaktoro de la homrajta sendependa respublika gazeto *Kroniko de la semajno*, kiu ĉi-jare estas agnoskita kiel la plej bona regiona gazeto en Rusio.**

*- ĉu vi havas infanojn?*

**Jes. Mia filo Ajgun finis medicinan fakultaton de universitato kaj laboras kiel kuracisto en Moskvo. Mia filino Ajna finis gimnazion ĉi-jare kaj iĝis studentino de la 1-a Moskva Medicina Instituto.**

*- ĉu vi scipovas aliajn lingvojn ?*

**Krom la rusa mi perfekte komprenas la lakan (mian gepatran) lingvon, sed pro la preskaŭ nula praktikado (de infaneco: ruslingva lernejo, universitato, interkomunikado, televido, literaturo, preso, ktp.) mi apenaŭ povas paroli.**

**Mi scipovas la polan, povas komunikiĝi kun reprezentantoj de kelkaj slavaj popoloj. La anglan mi povas legi, traduki, sed ankaŭ pro manko de praktiko multe pli bone komprenas ol parolas ĝin.**

*- Viaj hobioj?*

**Vojaĝoj, amika komunikado, fotado, komputilumado, ŝako.…**

*- Via sperto en Esperantujo, verkoj (mi ĵus legis ke vi verkis kursolibron).*

**Mi estas e-isto de 1968, estis prezidanto de dagestana E-klubo, estis elektita kiel estrarano de SEJM, de Rusia E-Unio. Inter 1997 kaj 2000 estis dufoje elektita prezidanto de Rusia E-Unio kaj A-komitatano de UEA.**

**Pasintjare aperis mia lernolibro *Esperanto? Tio estas simpla!*, kaj post kelkaj tagoj devas aperi la dua eldono. Mi prelegis en Svedio, Hungario, Belgio, ĉefe pri Dagestano kaj Kaŭkazio.**

*- ĉu vi povus priskribi kelkajn aspektojn kiujn vi prezentos dum la prelegoj?*

**Jes, mi rakontos pri la historio de Dagestano, ĝia unika multlingveco, ĝia riĉa historio. Mi provos prezenti ne unu Dagestanon, sed Dagestanon kiel Landon de Montoj kaj Monton da Lingvoj; landon de artoj kaj metioj, ĝiajn "vilaĝojn-ŝtatojn"; landon de la lastaj kavaliroj (tiel nomiĝis la libro de fama dagestana pentristo, kiu vivis en okcidento). Mi rakontos pri la kaŭkazia milito, kaj pri la nuna stato de Dagestano. Mi certe tuŝos ankaŭ la temon de la nunaj kaŭkaziaj militoj, precipe en la najbara Ĉeĉenio.**

*- Pri la rusaj bardoj: ĉu dum la vespero vi povus kanti la belajn kantojn de Bulat Okutĵava kaj la aliaj?*

**Jes, kutime mi kantas nur en amika rondo, kaj nur en la rusa lingvo, kaj precipe la kantojn de B. Okutĵava. Do, mi riskos iomete kanti.…**

*(demandis Yves NICOLAS)*

## Castanet-Tolosan

### 12 élèves du Collège Jean-Jaurès sont inscrits au Club d'espéranto.

**Ils s'initient deux fois par semaine à la langue internationale, et recherchent, au moyen de l'internet, des correspondants dans le but de faire un échange l'année prochaine. Ils ont déjà des adresses de jeunes Catalans, et souhaitent en trouver en Italie, Allemagne, Autriche, et Portugal.**

## Nia kalendaro

**Dec. 07 Manĝo-Klaĉo**

**16 Zam-festo**

**Jan 04 (aŭ 11) Manĝo-Klaĉo**

**26-27 Arrout-semajnfino**

**Fev. 01 Reĝkuko kun A. JUNUSOV ĉe la fervojistoj**

**08 Manĝo-Klaĉo ĉe EKC**

**Mar 01 Manĝo-Klaĉo**

**16-17 (ou 23-24) Arrout-semajnfino**

**Apr. 05 Manĝo-Klaĉo**

**Maj 03 Manĝo-Klaĉo**

**04-05 Arrout-semajnfino**

**Jun. 07 Manĝo-Klaĉo**

# Rapport d'activite 2000/2001

**Membres : 33 cette année (au lieu de 40 les années précédentes).**

**Le Conseil d'administration (komitato) comprend 7 membres.**

## A. Activités d'enseignement

**1. Cours**

**Cours hebdomanaires à :**

**– Maison de Quartier Rangueil dans le local prêté par la Mairie de Toulouse : perfectionnement par le théâtre ( 6 participants).**

**– MJC-Ancely : débutants (4 élèves).**

**2. Stages de week-end :**

**Quatre week-end de stage ont eu lieu à Arrout en Ariège : lors des deux premiers plusieurs groupes de niveau ont fonctionné. Lors des deux derniers, seul le groupe atelier d'écriture d'un scénario, puis réalisation du film, a fonctionné.**

**Autres cours, hors EKC : Université du Mirail avec Jean-Marc Leclercq**

**Comité d'entreprise SNCF avec Josée Lafosse (2 ou 3 cours).**

**à signaler : un nombre relativement important de débutants apprennent par leurs propres moyens (par l'internet, ou par manuel).**

## B. Activités de vulgarisation de l'espéranto

**1. Tenue de stands :**

**à la fête des associations, le 7 octobre, place du Capitole.**

**à la Semaine Européenne, du 7 au 12 mai, place St. Etienne.**

**Au Forum des Langues du Monde, le 20 mai, Place du Capitole.**

**2 Action *Découvrons l'espéranto et l'internet* au mois de mai (dans le cadre de l'Année Européenne des Langues, en partenariat avec la Maison de l'Europe).**

**Cette action comprenait :**

**– un concert/débat avec J.M. Leclercq et Flavie Audibert, au Café Le Rex le 16 mai**

**– un stand à la Semaine de l'Europe, du 7 au 12 mai, place St Sernin.**

**– un atelier " Découvrons l'espéranto et l'internet " le samedi 26 mai (Maison de l'Europe et ENSEIHT). 14 inscrits, 10 présents.**

**– une Conférence-débat " Les Européens ont-ils besoin d'une langue commune ; laquelle ? " à l'Université des Sciences Sociales. Brian Moon et Christian HEN; en partenariat avec le Mouvement Européen, section Hte Garonne/ Ariège, et la Maison de l'Europe. (Conférence remise au mois de novembre, pour indisponibilité du conférencier.)**

**L'ensemble de l'action a reçu le soutien financier du Conseil Général, de la délégation régionale Jeunesse et Sports, et de la banque Crédit Mutuel.**

**3. Medias**

**– *Capitole-Info* a annoncé nos cours de la Maison de Quartier Rangueil.**

**– *La Depêche* a informé sur nos cours et stages d'Ariège. (parfois dates tardives), mais semble-t-il pas sur nos concerts. (Kaj Tiel Plu et Jomo)**

**– Le *Flash* a annoncé le concert de JoMo dans la rubrique " Livres, Auteurs, Rencontres " !**

**– L'Atelier Esperanto et Internet a été annoncé dans la *Dépêche* (le matin même).**

**– Les radios ont été régulièrement tenues au courant de nos activités, mais nous ne savons pas si l'info a été diffusée.**

**– *TLT* : deux émissions, abondamment rediffusées :**

**– L'émission *Mémoire* avec Greg, le 12.03, a permis à quatre espérantistes de la région de s'exprimer pendant 25 mn.**

**–Trois minutes sur la vie de Rikardo Cash, (un Américain espérantophone de Toulouse) ont été diffusées la semaine du 4 juin.**

## C. Activités Culturelles

**On aurait pu penser qu'après avoir organisé le festival KAFE, l'association marquerait une pause. Au contraire, sous l'égide de l'Année Européenne des langues, cette année a été particulièrement riche en manifestations.**

**1. Conférences/Rencontres**

**– Mohamed kaj Zoreh SURUSH, jeune couple iranien, nous montrèrent avec l'aide de diapositives et une exposition d'objets artisanaux, des aspects de leur pays. La discussion s'engagea parfois vive, du moins avec Mohamed, car son épouse ne possédait pas tout à fait l'espéranto.**

**– Chris LONG, traducteur et auteur de poésie, nous a fait bénéficier le jeudi 26 avril d'une " conversation sur la littérature ", au local des Cheminots.**

**2. Concerts**

**– Le groupe catalan Kaj Tiel Plu nous a donné à l'occasion de la fête de Zamenhof le samedi 16 décembre un magnifique concert. Un récital de Gianfranco MOLLE faisait la première partie du concert. 50 billets vendus, pour moitié à des non espérantistes.**

**– le 16 mai au Café Rex, J.M. Leclercq et Flavie Audibert se sont produits. dans le cadre de l'action déjà citée (21 billets vendus).**

**3. Théâtre**

**Le 19 mai l'atelier-théâtre a présenté, à la Maison de Quartier Rangueil, un extrait de la pièce travaillée, *Rekta metodo*, à l'occasion de la fête du quartier. Cette pièce sera présentée en octobre au Congrés Catalan d'espéranto à Girona, et en décembre à Toulouse.**

## D. Vie de l'association

**1. Les repas-tchatche ont été très fréquentés, au point qu'il faut envisager un autre local.**

**10 " mangho-klachoj " ont eu lieu avec une fréquentation moyenne d'une douzaine de personnes. Celui de janvier organisé en commun avec les Cheminots, dans leur local, a été particulièrement réussi .**

**2. Des permanences ont été tenues, tous les mardi de 17 à 19 heures.**

**3. La bibliothèque s'améliore peu à peu, sous la responsabilité de Rikardo, avec l'aide d'une aide-bibliothécaire bénévole recrutée par le Centre Toulousain du Volontariat.**

**Des acquisitions ont été faites cette année, grâce à la subvention de la Fondation Thorsen. (11 livres, dont 10 donnés par la fondation).**

**4. Les émissions de Radio ont fonctionné régulièrement avec les mêmes équipes que l'an dernier : Christine et Flo à Canal Sud, et Flo et Rikardo à Radio Occitania.**

**Canal Sud : lundi de 20 à 21 h**

**Radio-Occitanie : jeudi de 19 à 20 h.**

**Radio FMR : mercredi (rediffusion).**

**Il nous manque toujours une évaluation de l'impact.**

**5. Cotisations à d'autres organismes**

**EKC fait partie du Comité Toulousain du Volontariat (est présent à son A.G. où on entend parler d'espéranto, et sur la Place du Capitole lors de la Journée des Associations début octobre),**

**et du Comité d'organisation de la Prima de las Lengas (stand place du Capitole au Forum des Langues).**

**EKC est membre de la Fédération Espéranto-Midi-Prénées.**

## E. Partenariats

**Une coopération s'est établie cette année avec l'association des Cheminots pour l'Espéranto (TEF). Echange systématique d'information, tracts annonçant les cours communs, repas-tchatches et soirée-causerie en commun.**

**Partenariat avec le Mouvement Européen et la Maison de l'Europe (conférence-débat dans le cadre du projet " Un mois, une langue " de la Maison de l'Europe).**

**Collaboration avec le Carrefour Culturel Arnaud Bernard, avec qui nous coorganisons le *Prima de las Lengas* (printemps des langues).**

**Notre association a participé au Concours des Associations mis en place par le Crédit Mutuel, pour fêter le centenaire de la loi sur les associations, avec le projet *Découvrons l'espéranto et l'internet*, qui a gagné le deuxième prix de l'Agence St-Agne.**

**J– Jeanne-MarieCASH**